

La unua kongreso de Volapuko en 1884.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1985 novembro 09.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-156/Radiokasedo-156-B-975-1985-Claude-kaj-Andree-GACOND-La-unua-kongreso-de-Volapuko-en-1884.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

La centdudek-paĝa libro de Reinhard Haupenthal dediĉita al la Unua Volapük-Kongreso en Friedrichshafen, aŭgusto 1884, ne povas ne altiri la atenton de ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la disvolviĝo de la planlingva ideo kaj eĉ nur de esperanto.

A.- Eble vi opinias, ke pli ol centpaĝa libro dediĉita al volapuka kunveno nur povas esti tedaĵo. Se vi komencos trafoliumi la arkivaĵojn, kiujn nelacigeble serĉadis Reinhard Haupenthal, vi rapide koristatos, ke liaj komentarioj al tiuj ĉi dokumentoj kaj liaj esperantigoj de reproduktitaj raportoj ne nur agrable legiĝas, sed samtempe renovigas la konojn, iom mitajn, kiujn oni ĝenerale havas pri la disvolviĝo de volapuko.

Cl.- Tiuj legaĵoj ankaŭ montras, kiom ni multe ŝuldas al la volapuka movado, kiu pozitive aŭ negative inspiris la esperanto-pionirojn. Multaj el ili fakte transiris de volapuko al esperanto, kiam la lingvo de Martin Schleyer diseksplodis en aron da reformaj projektoj. Ili ne bone komprenis la kaŭzojn de la vivĉeso de tiel rapide disvolviĝinta lingvo kaj per siaj pseŭdoklarigoj, ili ĝenerale fortikigis la kontraŭvolapukajn rakontojn, kiuj rapide fariĝis pli legendaj ol faktopriskribaj. Alvenis la tempo je veraj esploroj ĉefe dank' al la publikaĵoj de Haupenthal, kaj al la libro-kolektoj malkovritaj dum la pasintaj jaroj.

A.- Por doni al vi, ideon pri la etoso, kiu regis en la unua volapuka kongreso ni laŭtleĝos al vi la komencon de raporto de Rupert Kniele. Tiu ĉi dokumento estas titolita "La unua kongreso de la mond-lingvaj amikoj".

Cl.- "La invitoj al la unua ĝenerala asembleo de ĉiuj kluboj kaj anoj de la mondlingvo okazis jam antaŭ multaj monatoj per la organo Volapükabled kaj la adeptoj de la eltrovo de Schleyer loĝantaj en granda disto havis la tempon sufiĉan por prepari sin por vojaĝo al la ĉarma urbeto vurtembergia Friedrichshafen ĉe la Konstanca Lago.

A.- "La debatoj devus okazi la 26an kaj 27an de Aŭgusto 1884; sed jam la antaŭan vesperon la plimulto de la fremdaj gastoj alvenis al la kongresa urbo kaj la festa komitato akompanis ilin al la kongresejo; situanta tuj ĉe la bordo de la lago; la feste ornamita salono kazina.

Cl.- "Kompreneble la unua saluto direktiĝis al la universale respektata eltrovinto de la mondlingvo, sinjoro pastro kaj redaktoro Johann Martin Schleyer el Litzelstetten apud Konstanz, kiu plej kore bonvenigis ĉiujn alvenintojn, kiuj iĝis liaj karaj amikoj jam per korespondo.

A.- Sinjoro urba pastro Ege el Friedrichshafen kiel komisiito de la urbo transdonis al la fremduloj per varmaj vortoj siajn bonvenigajn salutojn kaj la perfekte instruita koruso de la urbo senteme kaj belege prezentis krom ceteraj kantoj ankaŭ la festan himnon verkitan de la juna instruisto mond-lingva, studento de teologio Zorell el Ravensburg kaj komponitan de sinjoro Schleyer.

Cl.- Ĉe ĉi okazo sinjoro D-ro pri medicino Obhlidal el Meidling apud Vieno tostis volapuke por sinjoro Schleyer tiel montrante, kiel facile kaj flue paroleblas 1a nova lingvo." Tiu diro montras, ke oni parolis en la germana lingvo.

A.- Antaŭ ol daŭrigi tiun ĉi legadon de la raporto de Rupert Kniele, ni interesiĝu pri la volapuka himno. Jen ĝia esperantigo:

Cl.- "Kultivi pacon kaj fratecon
kaj konkordon - jen devizo!
Jubilu al la verko!
"Unu lingvo!" kriu vi kun ni!
"Validu por la tuta tero!
Jen la cel' de nia Ligo!"

A.- Proklamu: kio do multigos
La prosperon de 1' homaro? -
Unu lingvo savon ja instruos,
Kiam sonos ĝi de poluso al poluso.
Tial sciu 1' universo:
"Unu lingvo por la tuta mond'!"

Cl.- Vivu do 1a lingvo,
kaj 1a sprita inventinto! -
Kaj la subtenantoj de 1' afero.
Kriu vaste tra la maro kaj la tero!:
"Estu unu lingvo, unu buŝo
Sur la tuta tera rond' . "

A.- Tiu lasta strofo en volapuko tiel diriĝas:

Cl.- Datuvel pŭka lifomöd!
Lifomsöd pakels ota!
Volapük aiflolanöd,
E vālapüked oma, E vālapüked oma:
"Oibinomöd su tal
Menade balepük bal!"

A.- Reinhard Haupenthal diras tion ĉi en noto koncerne tiun volapukan himnon de 1a teologia studento Zorel, kiun muzikigis Martin Schleyer, la aŭtoro de la lingvo:

Cl.- La impresan efikon de la Volapuka himno de Zorell mi povis sperti mem, kiam ĝin prezentis la skola koruso de Martin-Schleyer-Gimnazio je la 17-a de oktobro 1981 okaze de la 150-a aniverso de Schleyer. De tiu solenaĵo ekzistas video-registro.

A.- Eble ni foje povos aŭdigi al vi tiun ĉi registraĵon. okaze de vizito de Reinhard Haupenthal ĉe nia radio-elsendejo. Li tutcerte havos multon por rakonti pri la volapuka disvolviĝo kaj pri ties influoj sur la disvolviĝon de esperanto. Almenaŭ tiu ĉi raporto pri la unua volapuka kongreso multe memorigas la ekmalfermon de niaj esperanto-kongresoj.

Cl.- En Friedrichshafen la duan kongresan tagon Martin Schleyer alparolis la asembleon. Pri liaj diroj Haupenthal note diras: "La inaŭgura parolo de Schleyer, laŭ la komuniko de Kniele

restas pala kaj nenio-dira kompare al la kongresaj paroloj de Zamenhof." Ni tamen citu kelkajn el liaj vortoj:

A.- "La ideo de mondlingvo nuntempe troviĝas en la aero. Mi ricevas leterojn el ĉiuj kontinentoj, kiuj konfirmas min en tio kaj tial mi esperas, ke nia afero nun radikiĝis. Dum mia tuta vivo mi daŭrigos la komencitan verkon kaj ne plu rezignacios, eĉ se trafos min malhonoro kaj persekutoj ...

Cl.- Schleyer tiel konkludis sian paroladon:

A.- "Mi finas per nia devizo: Menade bal pŭki bal! - al unu homaro unu lingvo! kaj per la belaj vortoj de vurtembergaj ĵurnalo: "Ĉi ligilo de la lingvo fariĝu ligilo de la amo ĉirkaŭprenonta ĉiujn popolojn!"

Cl.- Kiel vi konstatas, esperanto ne havas la monopolon de la interna ideo. Ĝi jam esprimiĝis per iom similaj vortoj en la volapukaj kongresoj.

A.- Se vi deziras intimi kun tiuj volapukaj eventoj, kiuj estas kvazaŭ prahistorio de esperanto, la eldonaĵoj de Rheinhard Haupenthal, kaj ĉefe la verko La unua Volapük-kongreso, Friedrichshafen, Aŭgusto 1884, dokumentoj kaj komentoj" eldonita pasintjare ĉe Artur E. Iltis, estos por vi vera minejo da malkovraĵoj.

Cl.- Eldoniĝu samaj dokumentaroj pri la dua kaj tria volapukaj kongresoj kaj renkontu tiuj ĉi libroj, kiuj mankis ĝis nun al la historiistoj de la planlingva ideo, kreskantan legantaron. Tiel firmiĝos la konoj pri la unuaj jaroj de la disvolviĝo de esperanto kaj malaperos la mitoj kaj legendoj.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond instigis vin interesiĝi pri la eldonaĵoj de Artur E. Iltis kaj interalie pri la unua volapüka kongreso. Ĝis reaŭdo!